



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 7-a de Novembro 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Eran Vodevoz, Ŝlomo Ŝaĥar.

*Protokolo de la antaŭa kunsido (7-a de Novembro 2016)* – Rimarko de Ŝlomo: ni devas aldoni al tiu ĉi protokolo la regularon de elspezoado. Ŝlomo verkis hebree, Jehoŝua tradukos en E-on. (*Decidita jam la trian fojon!*)

### 1. La 18-a Israela Kongreso, Aŝkelon 2017 (Amri)

- a. **Datoj** definitivaj: 30.3-1.4, Antaŭkongreso en la Sudo (Jerusalemo, Morta Maro, Eilat, Petra) 26-30.3, Postkongreso en la Nordo (Haifa, Akko, Nazareto, Lago de Galileo) 2-4.4; jam estas interesiĝantoj. Amri preparis **afiŝon** kaj dissendis per FB kaj en Eventoj.
- b. **Kotizo** 380 NIS/persono/nokto + matenmanĝo, inkl. VAT (por **eksterlandanoj** 180 EUR por du noktoj, inkl. la vendredan vespermanĝon); Amri provas akiri rabaton per persona kontakto.
- c. **Mikaelo Bronŝtejn** korespondis kun Amri: petas koncerti, pretas mem pagi sian vojaĝon, sed petas senpagan loĝigon + senpagan partoprenon en la norda Postkongreso (kosto por ELI: 180 eŭroj + 3 noktoj en Port Inn en Hajfa). **Aprobata**
- ĉ. **"Asorti"**: kromkosto por la violono de Edgar – 102 EUR! Edgar interesiĝas ankaŭ pri la Antaŭkongreso (rabatita prezo). Petas diversajn teknikaĵojn: amplifilon, miksilon ktp – eble tro kostaj. Amri proponis alternativojn. Demandas pri gastigado ĉe e-istoj 22-26.3.
- Diskuto**: ne eblas gastigado. Li serĉu alian flugkompanion kiu ebligas kunporti violonon per manŝarĝo. Amri komunikos tion al Asorti.
- d. **Eblaj partoprenantoj eksterlandaj**: usona bahaa 3-persona familio Starrs (vivanta en Tajlando), Mikaelo Bronŝtejn (Rusio), Edgar el Asorti (Litovio), Mara Timermane (Latvio). Kromas pluraj aliaj interesiĝantoj (juna kubanino Angela, germana viro k.a.). La du ĉehinoj rezignis.
- e. **Reklamado**: Amri prezentis "evento-paĝon" en Facebook kaj distribuis ĝin kontraŭ 26.30 NIS; pli ol mil personoj spektis; krome informis tra Esperantujo per retlistoj kaj E-grupoj en FB. Proponas anoncon en Revuo E-o (vidu 3ĉ).
- f. **Aliĝilo**: necesas verki ĝin kaj ĝisdatigi la IK-paĝon en la retejo. **Jehoŝua** faros. **Jael** akceptis mastrumi la aliĝojn.
- g. **Propono**: Anstataŭ la ĵaŭdan vespermanĝon ELI **subvenciu** la programkostojn (artistoj, salono), por ke la partoprenantoj ne devu krompagi por la programo. **Akceptita**.
- ĝ. **Adaptigo por sabat-observantoj**. Ne estas bezonata, ĉar Miĥal, la sola kiu pri tio plendis, informis ke ŝi ĉiukaze ne partoprenas, pro aliaj kialoj.

### 2. Financoj

**Amri**: Vendoj dum la UK: totalaj **enspezoj** al la konto de ELI: 307 EUR.

Detaligo: 16 memorlibroj pri Josi Ŝemer x 12 EUR = 192 EUR; 16 novaj KD-oj x 10 (duono por ELI) = 80 EUR, 2 KD-oj "Kanti gefratoj" x 10 = 20 EUR, 5 broŝuroj far Amos Oz x 3 = 15 EUR.

**Ŝlomo**: bona novaĵo - la inspektoro de societoj aprobis nian financon raporton, petas tamen subtenajn dokumentojn pri la decido aĉeti oficejon.

### 3. Eldonado: Memorlibro/IE-162 (Amri)

- a. Eldad kaj Gabi finis provlegi, faris dekojn da korektoj; Amri kombinos kun grafikaj rimarkoj de Judith kaj plibonigoj de skanitaj artikoloj.
- b. Amri klopodos fini por povi disdoni dum la ZV, sed ne nepre havos tempon por ambaŭ, la Memorlibro kaj IE-162.



- c. Redaktoro por IE – rekompenco por la posteno (laŭ antaŭa decido ni ELI ofertu 1000 NIS por n-ro por logi redaktoron).
- ĉ. Amri proponas mendi anoncon en Revuo E-o pri la 18-a IK /Memorlibro Josi/KD. Jehoŝua proponas ke ĝi estu ankaŭ pri la lernolibroj far A. Kerbel, kaj ke ĝi 1/4-paĝa. Kosto: por la ekstera kovrilo 300 eŭroj. Ev-e reklami ankaŭ en "Lernu" kaj "Duolingo".
4. Amri prezentas la planon de **Dokumenta filmo** pri Zamenhof kaj E-o planata far la reĝisoro Caĥi Ŝif ( צחי שיף)
5. **Dratverejo** Jehoŝua raportas ke li subskribis la kontrakton kun la novaj loĝantoj. 2800 NIS monate.
6. **Projekciilo** Necesas ordigi ke ni povu libere uzi la projekciilon de la klubejo, ev-e la kun nura sciigo al la sekretariino. Cetere nia projekciilo nun "loĝas" ĉe Doron, kiu ne ĉiam povas veni. Ĉu eblas lasi ĝin konstante en iu ŝranko en WIZO, kiu estu disponita nur por ni?
7. **Zamenhofa vespero** Plej proksimaj lundoj al la datreveno estas 12 kaj 19.12. Oni preferas la duan. Matilda devas esplori, ĉu ŝi povas (post la kunsido Jehoŝua telefonis kaj ŝi konfirmis). Jehoŝua: ni devos krompagi por la granda salono, sed ni ŝparos la koston de nia regula klubĉambro.
8. **La Jerusalema LibroFairo**. Amri: ĉi foje ĝi okazos en la somero, 11-15 de **Junio** 2017, ankoraŭ tro frue por mendi.
9. **ELI-retejo**
- a. Statistika kalkulilo: Amri novigis la pasvorton kaj informis la ELI-membraron kaj eksterlande pri la statistiko: pli ol 50,000 vizitoj dum 4 jaroj. Rezultis pli ol 500 vizitoj en la lasta monato.
- b. Ĝisdatigi la IK-paĝon: aliĝilo, informilo, afiŝo (ne traktita pro la foresto de Dror).
9. **Propono de Oded** pri "La Eta Princo" – Amri mendis de UEA 3 ekzemplerojn.
10. **MONA** -
- a. Amri: La 10-a Mezorianta Kunveno en Kartvelio – **koincidas** kun la IK. Estonte necesos provi kunordigi kun la organizantoj de la MK por eviti koincidon, ev-e eĉ okazigi ilin unu post la alia por logi ekterlandanojn partopreni ambaŭ.
- b. Eran reprezentu ELI en MONA. Unuanime **aprobata**

**La venonta kunsido:** lunde, la 5-an de Decembro 2016, je 19:45

Protokolis: Amri Wandel